4ª Jaro Majo 1907 Nº 41ª

Internacia Scienca Revuo

OFICIALA MONATA ORGANO

de la

Internacia SCIENCA OFICEJO Esperantista

ĜENEVO - SVISLANDO

Direktoro : RENÉ DE SAUSSURE

Redakciaj Sekretarioj : P.-A.-H. MUSCHAMP, TH. RENARD

Manuskriptojn, gazetojn, librojn kaj interŝanĝojn, oni sendu al Internacia Scienca Revuo : 8, Rue Bovy-Lysberg, Ĝeneveo.

NUMOLOGIO[1]

Projekto pri internacia monsistemo.

Kiel tre prave skribis D-ro C. BOURLET en la lasta numero de Scienca Revuo :

« Ĉio, kio povas faciligi la interrilatojn ĉu sciencajn ĉu komercajn inter la homoj de diversaj nacioj nepre devas interesi la Esperantistojn. Ili ja laboras por la renverso de la ĉefa barilo, kiu ekzistas inter la popoloj, la lingva barilo ; sed flanke de tiu fundamenta demando troviĝas multaj malpli gravaj, kvankam tre studindaj problemoj, kies solvo estos signifa sensargo por la homaro. »

Mi ne intencas paroli tie ĉi pri problemoj internaciecaj, kiuj interesas nur tian kategorion da homoj aŭ ian specialan fakon de la homa aktiveco. Car kontraŭ la diskutado de tiaj problemoj, la Esperantistaro devas prizorgi sian neŭtralecon. Cetere, estas tre facile sciiĝi, ĉu ia internacieca demando estas interesonta ĉiujn Esperantistojn aŭ nur kelkajn ; per aliaj vortoj : ĉu la solvo de tia demando estos akceptebla de ĉiu homo, kiaj ajn estas liaj politikaj, religiaj aŭ naciaj opinioj.

Kompreneble, ia ajn proponata solvo devas antaŭ ĉio esti praktika kaj utila, t. e. : ĝi devas cele anstataŭi estantan staton de afero per estonta stato pli simpla. Sed, eĉ tio ne estas la plej grava vidpunkto por la Esperantistoj : internacieca problemo estos diskutebla kaj solvebla de la

[1] Scienco de la monecaj demandoj.

tuta Esperantistaro, nur se ĝia solvo povas liveri *lingvan* utilon, ĉar estas tute neŭtralaj nur la demandoj pri la lingvo. Tamen, estas dezirinde ke oni ne malkomprenu la sencon de la esprimo « lingva demando ».

La ĉefa celo de Esperanto estas kompreneblĝi por ĉiu homo la ideojn entenatajn en la vortoj naciaj. Ekzemple : la vorto *patro* estas internacia ilo farita por kompreneblĝi la ideon entenatan ĉu en la Franca vorto « *père* », ĉu en la Angla « *father* », ĉu en la Germana « *vater* », k. t. p., kaj oni povas esprimi tiun fakton per la identajoj:

(Esp.) Patro = (F.) père = (A.) father = (G.) vater = ...

Sammaniere, ĉar la longo da 1 metro egalas la longon da 3,281.. futoj anglaj, aŭ la longon da 0,469..sajenoj rusaj, k. t. p., oni povus skribi :

(Esp.) 1 Metro = (F.) 1 mètre = (A.) 3,281.. feet = (G.) 1 Meter = (R.) 0,469.. sajeni = ...

kaj konsideri la teknikan esprimon internacian « *1 metro* » kiel la *tradukon* de la teknika angla esprimo « *3,281... feet* », aŭ de la teknika rusa esprimo « *0,469.. sajeni* » [1].

Tiu vidpunkto estas tre grava : efektive la ĉi supra difino de la teknika vorto *metro*, kvankam nur lingva difino, estus tute same kiel la definitiva alpreno de la metra sistemo ĉe la Esperantistaro; ĉar, laŭ la logiko internacia, de $a = b$ sekvas $10\,a = 10\,b$, $100\,a = 100\,b$, kaj laŭ la Esperantaj vortfaradaj reguloj : 1 metrodeko = 1 deko da metroj, 1 metrodekono = 1 dekono da metro. Sekve sen pliaj difinoj :

(Esp.) 1 Metro = (F.) 1 mètre = (A.) 3,281... feet = (G.) 1 Meter = (R.) 0,469... sajeni = ...

1 Metrodeko = 1 décamètre = 32,81... feet = 1 Dekameter = 4,69... sajeni =...

1 Metrocento = 1 hectomètre = 328,1... feet = 1 Hektometer = 46,9... sajeni =...

1 Metromilo = 1 kilomètre = 3281,.. feet = 1 Kilometer = 469,... sajeni =...

1 Metrodekono = 1 décimètre = 0,3281... feet = 1 Dezimeter = 0,0469... sajenj =...

1 Metrocentono = 1 centimètre = 0,03281... feet = 1 Centimeter = 0,00469 sajenj =...

[1] Kompreneble tiu teknika tradukо ne forigos la tradukojn de la komuna lingvo, kiel : (Esp.) Futo = (A.) foot = (Fr.) pied = (G.) Fuss.

1 Metromilono = 1 millimètre = 0,003281... feet = 1 Millimeter = 0,000469... sajenj = ...

La tuta metrosistemo kušas tie či, kaj estas rimarkinde ke per la uzado de Esperanto, la metra sistemo povas iĝi internacia sen deviga altrudo de tiu sistemo al ĉiuj nacioj, ĉar la celo de ia ajn internacia sistemo estas nur interkomprenigi sed ne forigi la naciajn sistemojn. Ni Esperantistoj tre bone komprenas tion, ĉar la celo de nia lingvo estas tute sama.

Sekve, se niaj Anglaj amikoj ne deziras alpreni la metran sistemon por sia propra uzado, ili tute rajtas rifuzi ĝin [1]. Sed, se la Internacia Scienca Komitato Esperantista decidas alpreni la esprimon « *unu metro* » kiel la « teknika » traduko de la esprimoj: (A.) « *3,281 feet* », (F.) « *1 mètre* », (G.) « *1 Meter* », (R.) « *0,469... sajenj* », k. t. p., kaj se tiu decido estos aprobita de la Lingva Komitato, ĉiuj Esperantistoj (Anglaj kaj Rusaj ankaŭ) devos esprimi la longecajn mezurojn per metroj, metromiloj, aŭ metrocentonoj, metromiłonoj, k. t. p.: kaj se, pro ia ajn kaŭzo, ili deziras esprimi longecan mezuron per nacia unuo, ili devos aldoni inter krampoj en la teksto, la teknikan sencon de tia mezuro, t. e. la tradukon en la internacia sistemo.

Oni tuj vidas ke saman aŭ similan metodon oni povus peruzi por krei aliajn internaciajn sistemojn, kiuj estos nur internaciaj kompreniĝiloj, sangante aŭ altrudante neniel la naciajn kutimojn; kaj por atingi tian celon ne estas necese ricevi la aprobon de la diversaj regnestraroj; sufiĉas havi tiun de la Esperantistaro: la disvastiĝon de tiaj internaciaj sistemoj tra la tuta mondo prizorgos la lingvo mem Esperanto, ĉar pli potencegan disvastigilon oni ne povas trovi.

* * *

Inter la plej gravaj internaciaj sistemoj proponeblaj troviĝas unuavice: *internacia sistemo por monaj valoroj.*

Tia sistemo estas tre dezirinda, ĉar oni bezonas nur legi la anoncojn presitajn en la Esperantaj revuoj kaj gazetoj por esti konvinkita, ke la alpreno de internacia mono estas urĝa, almenaŭ ĉe la Esperantistoj (legu ekzemple la kovertpaĝojn de Scienca Revuo).

[1] La lastan monaton la Brita Parlamento malakceptis la proponon enkonduki la metran sistemon en Anglujon.

La solvo de la demando pri internacia mono (aŭ valormezurilo) ne estas malfacila sed ĝi ne estas tute simila kiel la demando pri internacia sistemo de pezoj kaj mezuroj. Efektive, ĉar la metra sistemo estas la sola *decimala* mezursistemo, ĝi montriĝis tiom pli oportuna ol la aliaj, ke ĝi prosperas altrudi sin iom post iom al ĉiuj nacioj. Male, inter la diversaj monsistemoj naciaj, preskaŭ ĉiuj estas jam decimalaj, ekzemple: la Franca (1 franko = 100 centimojn), la Germana (1 marko = 100 pfenigojn), la U. Ŝ. A.'a (1 dolaro = 100 cendojn), la Itala (1 liro = 100 centezimojn), la Hispana (1 peseto = 100 centimojn), la Rusa (1 rublo = 100 kopekojn), la Greka (1 drakmo = 100 leptojn), la Portugala (1 milrejso = 1000 rejsojn), k. t. p. Oni do, ne pro sendube supereco, povas altrudi unu el tiuj naciaj sistemoj al la tuta mondo [1]. La sola rimedo por solvi la demandon estas la elpenso de *artefarita neŭtrala mono*, tute same kiel Esperanto estas artefarita neŭtrala lingvo. Ĉiuj nacioj povos konservi sian kutiman monon, sed ĉiufoje kiam oni skribos aŭ parolos Esperante (t. e.: ĉiufoje kiam oni interrilatas kun fremduloj), oni devos esprimi ĉiujn monvalorojn per la internacia monunuo; kaj se pro ia ajn kaŭzo oni deziras uzi naciajn monunuojn, oni devos tuj klarigi la nomitan valoron per internacia monunuo [2].

Mi parolu nun pri la elekto de la internacia monunuo: oni devas unue atenti, ke la tagaj varioj de la valoro de l'naciaj moneroj (kursvarioj) tute ne koncernas la demandon pri internacia artefarita mono, ĉar la nova universala monunuo estas fiksota rilate kun sia interna *ora* valoro sendepende de ia ajn kursdiferenco kaj de ia disnivelo de paper- aŭ argentmono rilate kun oro.

Ankaŭ ne estos necese, ke ekzistos realaj moneroj de la proponata mono internacia; monunuo teoria kaj artefarita tute sufiĉas, ĉar ĝi estas nur la difino de ia vorto teknika proponata por la Esperanta teknika vortaro. Cetere oni jam konas la rilatecajn valorojn de la diversaj naciaj monoj, ekzemple: 2,08 frankoj = 1,652 ŝilingojn = 1,69 markojn =

[1] Oni rimarku tie ĉi ke la Franca aŭ pli ĝuste la Latina monsistemo estas teorie malpli arbitra ol la aliaj, ĉar ekzistas simpla rilato inter la monunuo kaj la metra pezunuo (1 franko = 5 gr. da argento) sed tia rilato ne tre taŭgas, ĉar la monvaloroj estas nuntempe fiksitaj per la ora metalo ne per la argenta; la valoro de l'argento tiom plimalaltiĝis, ke la valoro de 1 franko estus tro malgranda por internacia monunuo. Plie, la franka unuo ne estas neŭtrala unuo.

[2] Tiamaniere sufiĉos se ĉiu homo lernos la nacian monsistemon sian kaj la internacian, la saman por ĉiuj.

0,407 dolarojn = 0,78 rublojn = ... ; sekve, se mi signas la universalan monunuon per la vorto *speso*, la difino de tiu nova teknika vorto estos jena :

(Esp.) x Spesoj[1] = (Fr.) 2,08 francs = (A.) 1,652 shillings = (G.) 1,69 Marken = (U. Ŝ. A.) 0,407 dollars = (R.) 0,78 rubl. =...

kaj la problemo estos tute solvita tuj kiam la kvanto x estos ricevinta difinitan nombran valoron.

Por fiksi la valoron de x, mi proponas la jenan metodon :

1° Oni donu al la universala unuo « speso » teorian monvaloron tre malgrandan, tiamaniere ke oni povu esprimi ian ajn monsumon nacian per nombro entjera da spesoj.

2° Flanke de la teoria unuo « speso » (uzota nur por kalkuloj) oni uzu praktikan unuon milfoje pli grandvaloran, kies nomo estos kompreneble : *spesmilo*. La spesmilo estus do por la Esperantistoj tute same kiel la franko por la Francoj, la ŝilingo por la Angloj, la marko por la Germanoj, la dolaro por la Amerikanoj, k. t. p. ; fine oni uzu ankaŭ la vorton *spesdeko* por signi la centonan parton de unu spesmilo, ĉar en preskaŭ ĉiu lando oni kutimas uzi du monunuojn, unu centfoje pli grandvaloran ol la alia (ekz. frankoj kaj centimoj, markoj kaj pfenigoj, dolaroj kaj cendoj, k. t. p.).

Resume, mi proponas du praktikajn unuojn (la spesmilo kaj la spesdeko) tiajn ke :

1 spesmilo = 100 spesdekojn (1 Sm. = 100 Sd.)

kaj unu teorian unuon (la speso) tian ke :

1 spesmilo = 1000 spesojn (1 Sm. = 1000 S.).

1 spesdeko = 10 spesojn (1 Sd. = 10 S.)

3° Oni fiksu la teorian valoron de la speso per la valoro de la spesmilo, kiu estos tiamaniere elektita, ke ĝi egalvaloros kiel eble plej proksime la diversajn naciajn unuojn aŭ iliajn oblojn. Nun, se oni observas ke :

2,522 (F.) frankoj = 2,042 (G.) markojn = 2 (A.) ŝilingojn = 0,4866 (U. Ŝ. A.) dolarojn = 0,97 (Jap.) yenojn = 0,494 (Meks.) pesojn =...,

oni povas skribi :

1 Spesmilo = $2\,{}^1/_2$ frankojn $\pm\,\alpha$ = 2 markojn $\pm\,\beta$ = 2 ŝilingojn $\pm\,\gamma$ = ${}^1/_2$ dolaron $\pm\,\delta$ = 1 yenon $\pm\,\varepsilon$ = ${}^1/_2$ peson $\pm\,\xi$ =...

la kvantoj α, β, γ, δ, ε, ξ, ...estante tiom malgrandaj, ke en la plej multaj okazoj oni povos ilin malatenti, kaj konsideri unu spesmilon proksimume kiel $2\,{}^1/_2$ frankojn, aŭ kiel 2 markojn, aŭ kiel 2 ŝilingojn, aŭ ${}^1/_2$ dolaron, aŭ 1 yenon, aŭ ${}^1/_2$ peson, k. t. p., laŭ la bezonoj.

[1] Tiu vorto estas devenigita de la Franca vorto « *espèce* », aŭ de la Angla « *specie* ».

* * *

Tamen tia difino de la teknika vorto « spesmilo » estas nur *alproksimiga*, kaj estas necese por la komercistaj kaj la bankistaj kalkuloj, ke oni fiksu pli precize la valoron de l'spesmilo, t. e. ke *oni rilatigu ĝian valoron kun preciza pezo da pura oro.*

Tiucele, mi citu la verkon de S-ro Maurice L. Muhleman *(Diversaj monsistemoj de l'mondo* [1], p. 168):

« La tre dezirinda internacia monunuo estas ankoraŭ estontajo, ĉefe pro diverseco de la nunaj unuoj kaj pro la malfacileco šanĝi ilin tiele, ke oni ne estos devigata fari kalkulegojn por aliformigi naciajn monvalorojn en internacian.

« Ormonero da 25 frankoj estas rekomendita por tiu celo. La ekarto inter ĝi kaj similaj moneroj de aliaj ĉefaj nacioj estos plej bone montrita, se oni komparas la pezojn da pura oro, kiun ili entenas, jene:

« 25 frankoj = 7,258 gramojn da pura oro
« 5 dolaroj = 7,523 » » » »
« 1 livro st. = 7,322 » » » »
« 20 markoj = 7,168 » » » »

Pri tiuj valoroj oni povas fari tri rimarkojn : 1° tiuj gravaj ormoneroj naciaj valoras ĉiuj proksimume 10 spesmilojn (ĉar 1 spesmilo valoras proksimume 2,50 frankojn) sekve la fundamenta universala orunuo estos : *10 spesmiloj* (aŭ *1 spesdekmilo).*

2° la mezvaloro de la ĉi supre cititaj orpezoj estas : *7,318 gramoj* da oro.

3° se oni atentas, ke la moneroj ne estas puroraj, ĉar la kvanto da oro kiun ili entenas estas kutime nur la $^{9}/_{10}$ (0,900) aŭ la $^{11}/_{12}$ (0,916 $^{2}/_{3}$) de ilia pezo, oni tuj vidas ke la elektota universala orunuo estas pezonta : *8 gramojn* [2].

Nun por plene difini la valoron de 10 spesmiloj, oni bezonas nur decidi kian proporcion da pura oro tiu ormonero devos enteni ; ĉu $^{9}/_{10}$ (Franca aŭ Latina kutimo), ĉu $^{11}/_{12}$ (Angla kutimo) ?

En la unua okazo, la kvanto x da pura oro entenata en la 10-spesmila ormonero estus liverita per la ekvacio : $x + x/9 = 8$; en la dua okazo, per : $x + x/11 = 8$. T. e. : en la unua okazo :

$x = 7{,}2$ g. = preskaŭ precize *25 frankojn,* kaj en la dua okazo :

$x = 7{,}333..$ g. = preskaŭ precize *1 liv. sterl.*

---

[1] « *Monetary systems of the world* », New-York, 1895, ĉe Ch. H. Nicoll.

[2] Por ke, se iam oni presigos internacian ormoneron da 10 spesmiloj, ĝia pezo estu esprimebla per entjera nombro da gramoj.

Sed se oni rememoras, ke la pezo da puroro entenota en la universala orunuo devas ankaŭ, kiel eble, alproksimiĝi la mezan pezon: 7,318 gramoj (vidu rimarkon duan), oni konkludos ke la valoro $x = 7{,}333...$ gr. estas multe pli oportuna ol la valoro $x = 7{,}2$ gr.

Efektive, se oni iam presigus internacian ormoneron da 8 gramoj je 0,900 la Francoj kaj Latinoj ne akceptus ĝin anstataŭ 25 fr., nek la Angloj anstataŭ 1 liv. st., nek la Amerikanoj anstataŭ 5 dolarojn; ĉar $7{,}2 < 7{,}258 < 7{,}322 < 7{,}523$.

Sekve la valoro de l'*speso* estos difinita jentiele:

10 spesmiloj (aŭ *1 spesdekmilo*) *estas la valoro de 8 gramoj da oro je* $^{11}/_{12}$.

Ĉar 10-spesmila ormonero entenas 7,333... gr. da puroro, oni havas la proporcioĵn:

$$\frac{10\ \text{Sm.}}{7{,}333\ldots} = \frac{1\ \text{liv. st.}}{7{,}322} = \frac{25\ \text{fr.}}{7{,}258} = \frac{20\ \text{M.}}{7{,}168} = \frac{5\ \$}{7{,}523}$$

aŭ per aliaj vortoj:

10 SPESMILOJ = 1,0015 liv. sterl. = 1 £ + $^1/_2$ penco.
= 25,26 frankojn = 25 fr. + 25 cent.
= 20,46 markojn = 20 M. + 45 pf.
= 4,875 dolarojn = 5 $ — 12 $^1/_2$ cend. ($^1/_8$ $).

Se tia rezultato ŝajnas iom favori la Anglojn, oni ne devas forgesi ke ĝi estas ricevita nur per kalkulo sen ia aĵn nacieca priokupo; plie tiu rezultato estas la plej oportuna, ĉar la Angla sistemo estas la ununura monsistemo, kiu ne estas decimala (1 £ = 20 š. = 240 p.). Sekve, kvankam oni povos preskaŭ ĉiam anstataŭi 10 spesmilojn per 1 £, tamen la internacia decimala sistemo estos tute malsama kiel ĝa Angla sistemo, kaj ne ekzistos simpla rilato inter la spesoj kaj la Anglaj pencoj. Efektive oni havos: 2 šilingoj = 1 spesmilon (aŭ pli precize: 2 šilingoj = 998 $^1/_2$ spesojn), sed 1 penco = 41 $^2/_3$ spesojn. Oni do vidas, ke la kalkulo necesa por aliformigi nacian monsumon en internacian, ne estos pli facila por la Angloj ol por la aliaj nacioj; la kalkuloj estos samfacilaj por ĉiuj nacioj, pro la fakto kial la aliaj nacioj jam posedas decimalajn sistemojn.

Plie, se iam oni presigos 10-spesmilan ormoneron internacian, sendube la Latinoj (Francoj, Italoj, Hispanoj, k. t. p.) akceptos ĝin anstataŭ 25 fr., la Angloj anstataŭ 1 liv. st., la Germanoj anstataŭ 20 markojn, la Portugaloj anstataŭ 4 $^1/_2$ milrejsojn; nur la Amerikanoj ne akceptus ĝin anstataŭ 5 dolarojn, sed la korektilo estus tre simpla por ili, ĉar ni vidis

ke 10 spesmiloj = 4 $^{7}/_{8}$ dolarojn, aŭ 20 Sm. = 9 $^{3}/_{4}$ $, aŭ pli bone: 2 × (10 Sm.) + $^{1}/_{4}$ $ = 10 $. Sekve la Amerikanoj akceptus anstataŭ 10 dolarojn: *2 orajn spesdekmilojn kaj 1 kvaronon da dolaro* (argenta monero tre uzata en la Unuigitaj Ŝtatoj).

Por la Rusoj, *1 ora spesdekmilo estus pratike* la samo kiel *9 $^{1}/_{2}$ rubloj* (ĉar la diferenco estas nur 3 kopekoj).

Jen estas tabelo montrante la valoron de la diversaj naciaj monunuoj rilate kun la internacia:

GENERALA TABELO DE NACIAJ MONUNUOJ [1]

kune kun ilia internacia valoro je « spesoj ».

(*ora* fundamento).

Franc. / Belg. / Svis.	1 franko (= 100 centimoj)	=	396	Spesoj	1 Spesmilo	=	2,5260	frankoj.
Ital.	1 liro (= 100 centesimoj)	=	»	»	»	=	»	liroj.
Hispan.	1 peseto (= 100 centimoj)	=	»	»	»	=	»	pesetoj.
Angl.	1 liv. sterlinga (= 20 ŝilingoj)	=	9985	»	»	=	0,1001548	liv. st.
»	1 ŝilingo (= 12 pencoj)	=	499	»	»	=	2,0031	ŝilingoj.
»	1 penco	=	41 $^{3}/_{4}$	»	»	=	24,037	pencoj.
U. Ŝ. A.	1 dolaro (= 100 cendoj)	=	2051	»	»	=	0,4875	dolaroj.
German.	1 marko (= 100 pfenigoj)	=	489	»	»	=	2,0461	markoj.
Aŭstr.	1 krono (= 100 helerojn)	=	416	»	»	=	2,40	kronoj.
Rus.	1 rublo (= 100 kopekoj)	=	1056	»	»	=	0,947	rubloj.
Skand.	1 krono (= 100 oerojn)	=	550	»	»	=	1,82	kronoj.
Holand.	1 floreno (= 100 censoj)	=	826	»	»	=	1,21	florenoj.
Portugal.	1 milrejso (= 1000 rejsoj)	=	2217	»	»	=	0,450	milrejsoj.
Grek.	1 drakmo (= 100 leptoj)	=	396	»	»	=	2,5260	drakmoj.
Rumân.	1 lejo (= 100 banoj)	=	»	»	»	=	»	lejoj.
Serb.	1 dinaro (= 100 paraloj)	=	»	»	»	=	»	dinaroj.
Bulgar.	1 levo (= 100 stotinkoj)	=	»	»	»	=	»	levoj.
Arĝ. Resp. / Kolumbio / Urugvajo	1 peso (= 100 centavoj)	=	1980	»	»	=	0,505	pesoj.
Brazil.	1 milrejso (= 1000 rejsoj)	=	1120	»	»	=	0,893	milrejsoj.
Ĉilio.	1 peso (= 100 centavoj)	=	1472	»	»	=	0,679	pesoj.
Ĥin.	1 taelo (arĝ) (= 1000 kaŝoj)	=	3246	»	»	=	0,308	taeloj.
Egipt.	1 Egipta liv. (= 100 piastroj)	=	10300	»	»	=	0,09715	Eg. liv.
»	1 piastro (= 40 paraloj)	=	103	»	»	=	9,715	piastroj.
Hind.	1 rupio (= 16 annoj)	=	970	»	»	=	1,031	rupioj.
Japan.	1 yeno (1897) (= 100 senoj)	=	1021	»	»	=	0,979	yenoj (1897).
»	1 » (1871) (= 100 »)	=	2042	»	»	=	0,490	» (1871).
Meksiko.	1 peso (= 100 centavoj)	=	2019	»	»	=	0,495	pesoj.
Pers.	1 tomano (= 10 kranoj)	=	3530	»	»	=	0,2832	tomanoj.
Peruo.	1 suno (= 10 dinerojn)	=	1980	»	»	=	0,505	sunoj.
Turk.	1 Turka liv. (= 100 piastroj)	=	9103	»	»	=	0,10983	Turk. liv.
»	1 piastro (= 40 paraloj)	=	91	»	»	=	10,983	piastroj.
Venez.	1 bolivaro (= 100 centavoj)	=	396	»	»	=	2,5260	bolivaroj.

[1] Por la kalkuloj oni uzis ĉefe la valorojn entenatajn en la « *Poŝlibro internacia* » de S-ro G. NORMAN, escepte por la ora rublo, kies valoro oni konsideris kiel egala je 2,666... fr. (kaj ne je 4 fr., nominala valoro de l'malnova rublo).

Laŭ tiu tabelo la *lingva* difino de la nova teknika vorto « speso » estos jena :

(Esp.) 1 Speso = (F.) 0,002526 frankoju
= (A.) 0,00010015 liv. st.
= (G.) 0,002046 markoju
= (U. S. A.) 0,0004875 dolarojn
= . . . . . .

Kiel ekzemplo de la uzmaniero de tiu ĉi vorto teknika, ni citu la jenan frazon : « *La prezo de la jara abono al Internacia Scienca Revuo estas 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj) antaŭpageblaj per poŝtmandato.* »

Estus dezirinde, se la demando pri internacia monunuo povus esti studata kaj diskutata de la Internacia Scienca Komitato kiel eble plej baldaŭ, kaj ĝia decido submetata al la Lingva Komitato por definitiva aprobo. Eble la aferon oni povos ankaŭ diskuti en Cambridge (Angl.), okaze de la tria Universala Kongreso.

Intertempe oni uzu provizore la proponatan teknikan esprimon *speso*, kiel ian ajn alian novan vorton, t. e. : ĉiufoje kiam oni bezonos tiun vorton por esprimi internacie monvalorojn. Oni tiam uzu la jenajn mallongigojn :

S. = speso, *Sd.* = spesdeko, *Sm.* = spesmilo, kaj kelkafoje : *Sdm.* = spesdekmilo, *Sc.* = spescento.

La internacia monunuo « speso » estus ankaŭ tre taŭga por la poŝtaj spezoj kaj por internaciaj poŝtmarkoj ; la nuna transporta pago de letero sendota fremdlanden estas : 25 centimoj, aŭ 20 pfenigoj, aŭ 5 cendoj, aŭ 2 $^1/_2$ pencoj, t. e. internacie : *10 spesdekoj* (aŭ *1 spescento*). Plie, se la regnestraroj interkonsentus presigi internaciajn poŝtmarkojn je 1 spescento, 1 spesdeko kaj 1 speso, oni povus uzi ilin kiel internacian monon sendeblan per letero kaj tute taŭgan por malgrandaj elpagoj.

René de Saussure,
Ĝenevo (Svis.).